



LA JUNA VIVO

MONATA BAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio: S-ino E. Burgler, Geleen, Markt 64, Nederlando

Administracio: K. Kranenburg, Steenschuur 10, Leiden, Nederlando

Sekretariejo de TEJO: Juliana van Stolberglaan 9, Naarden, Nederlando

Giro de TEJO Nro 537168

Jarabono 3 ned. guld. aŭ egalvaloro

Kie estas la nederlandaj TEJO-anoj?

Ankoraŭ dum la pasinta jaro forlasis la kasisto kaj la helpsekretario siajn funkciojn por daŭrigi siajn studojn. Ambaŭ knaboj, ankoraŭ junaj kaj antaŭ gravaj ekzamenoj, perdis preskaŭ du jarojn pro senĉesa laborado por nia movado. La prezidanto restis sola kun la espero, ke li baldaŭ trovos taŭgajn helpantojn en la vico de la memvolontuloj, kiuj sin anoncos amase por ĉi funkcioj. Leteroj restas neresponditaj, gravaj organizaj aferoj nedeciditaj. Jam dum monatoj ne aperis Organizaj Informoj en LJ.V. Ĉu nia organizo dormas? Mi ne kredas tion. Sed mankas la necesaj kunlaborantoj.

Kie ili estas? Kie ili restas? Kie estas la kritikemuloj?

Nederlandaj gejunuloj, nederlandaj TEJO-anoj! La okuloj de la tutmonda esperantistaro estas je vi fiksitaj. Baldaŭ okazos nia 10a IJK en Hilversumo. Ni prenu la ŝarĝon de la gvidado de TEJO sur niajn ŝultrojn, metu ĉiujn argumentojn alispecajn flanken kaj man' en mano kunhelpu fari TEJO-n denove granda kaj forta. Pripensu kaj komprenu, ke ununura homo, kiel en ĉi kazo via pre-

zidanto, ne povas ĉion aranĝi, kiom da laboremo aŭ da entuziasmo li eĉ havas. Ankaŭ la homa povo havas siajn limojn.

Junularo, la maljunaj TEJO-anoj kun doloro en siaj koroj vidas vian indiferenton. Estas inter ili kelkaj, kiuj embuske atendas por preni la gvidadon de la aferoj je si. Montru gejunuloj, ke vi estas indaj kaj kapablaj gvidi viajn aferojn mem, montru, ke vi povas pere de la helpo kaj spertoj de la maljunaj kaj malnovaj anoj, kiujn vi nepre ne devas flankenŝovi, fari el TEJO fortan organizon, kien volonte venos kaj kie volonte restados la junaj geesperantistoj el la tuta mondo. Se vi volas kritiki, estas en ordo. Tamen zorgu, ke via kritiko estu justa kaj konstrua. Se laŭ vi la metodoj estas malĝustaj, montru la pli bonajn, kiuj havas la samajn aŭ eĉ pli bonajn rezultojn. Se laŭ vi iu funkciulo ne taŭgas, zorgu, ke dum la sekvonta IJK venu pli taŭga persono sur ties lokon. Ne gravas, kiun taskon vi prenas je vi por pligrandigi vian propran organizon, sed ne restu senlabora kaj indiferenta, ne restu sta-

Korespondado.

Karlo estis dum pluraj jaroj unu el miaj plej fidelaj eksterlandaj korespondantoj. Ni regule intersanĝis interesajn leterojn, poŝtkartojn, bildkartojn kaj poŝtmarkojn (ĉi-lastajn li por sia patro kaj mi por mia frateto). Ho, kiel longaj estis niaj polemikoj kaj kiel ni sopiris al la leteroj!

Sed iom post iom venis la tempo, ke mi ĉion sciis pri Karlo, pri liaj familio, lando kaj ideoj; renverse li la samon sciis pri mi. La vetero fariĝis la ĉeftemo, ĉar ĝi ja restas kaprica. Ĉar leteroj por tiaj komunikoj estas superflujaj, ni ek de tiam

nur intersanĝis poŝtkartojn, bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Tamen de kiam oni plialtigis la poŝtjtarifojn, la poŝtkartoj venis kaj iris pli kaj pli malofte kaj fine nur bildkartojn kaj poŝtmarkojn ni sendis unu al la alia.

Pasintmonate mi festis mian naskiĝtagon. Inter la bondeziroj kaj gratuloj en mia leterkesto mi vane serĉis bildkarton de Karlo.

Kaj nun, nun li intersanĝas nur poŝtmarkojn, li por sia patro kaj mi por mia frateto!!



ranta sur la rando de la vojo, sur kiu marŝas la malmultaj entuziasmiuloj, sed ekmarŝu ankaŭ vi mem en la vico kaj entuziasmigu per via ekzemplo la laciĝantojn.

TEJO-anoj, via prezidanto atendas viajn leterojn, per kiuj vi proponas (kaj poste ankaŭ donas!) vian kunlaboron.

E. Burgler.

Konsilo de saĝulo.

Kondu tu en viaj agoj kiel eble firme kaj decide. Estu konstanta eĉ en la dubaj opinioj, se jam elektitaj, kvazaŭ ili estus tute certaj; imitante tiujn vojirantojn, kiuj erarintaj en la arbaro, ne devas konfuze ĉirkaŭvagi nek halti, sed marŝi ĉiam kiel eble plej rekte, laŭ difinita direkto, ne

ŝanĝante ĝin pro banalaj motivoj, eĉ en la okazo, ke oni elektis ĝin hazarde; ĉar tiel se oni ne venos, kien oni intencis, almenaŭ oni atingos lokon, kie, kredeble oni troviĝos pli komforte ol meze de la arbaro.

Descartes.

(El: Boletín de la Federación Esperantista Española, nro 11/1953).

La listo de aliĝintoj aperos baldaŭ. Ĉu ankaŭ via nomo estas sur ĝi?

OKUPIĜO PRI PRIMITIVO EN NIA TEMPO.

La supran problemon pritraktis iĝontaj danaj studentoj por la ekzameno somere 1953. La respondoj al tiu temo estis tre diversaj, precipe ĉar la studentoj konceptis la ideon „primitivo“ aŭ el negativa aŭ el pozitiva vidpunkto. Pri la fakto, ke okupiĝo pri primitivo estas tipa por nia tempo, ni interkonsentis. Sed tie ankaŭ haltis ĉiu speco de simileco. La negativuloj kondamnis la tendencon de nia tempo al okupiĝo pri primitivaj, t.e. simplaj, krudaj, preskaŭ bestaj instinktoj kaj sentoj, kiuj aperas en kelkaj sportoj, kiel ekz. en boksado, aŭ pri la tro simplaj kaj tro legataj desegnaj serioj en gazetoj ktp., dum la pozitivuloj, al kiuj apartenis ankaŭ mi, skribis ion similan al tio ĉi:

La daŭre kreskanta civilizacio nas-kigis ĉe multaj homoj naturan bezonon por en diversaj manieroj liberigi de la ligiloj, kiujn tiu evoluo metas sur ilin, kaj kiuj kelkfoje estas sentataj streĉpremantaj. La vortoj de Rousseau „Reen al naturo“ gajnis eble nun pli da aliĝo kaj kompreno ol eĉ en la romantika periodo, kiam ili estis elparolataj. Ŝi sentas bezonon profundigi en sin mem kaj eltrovi, kiom vere apartenas al la natura mi, kaj kulturi tiun ĉi originan en si mem, tiom kiom eblas.

Sed la moderna spirito de l' epoko preskaŭ ne restlasas tempon aŭ eblecon por mem pensi. Nia tempo laŭdas aktivecon kaj rapidecon, kaj ĉiu pasiva momento estas konsiderata tempperdo. Ĉi tie eble la eŭropa kulturo povus ion lerni de la hinda, kiu ĉiam pleje estimis la pensadon. La celo de ambaŭ kulturoj estas feliĉo por kiom eble plej multaj. Dum miloj da jaroj en la profundeco de ilia propra animo, la hindoj per senlaca meditado serĉis la individuan feliĉon kaj komprenon de la vivo. Ili trovis iun veron Sed la hinda filozofado jam batalas sian mortbatalon - pro la enpenetranta eŭropa civilizacio.

Ebleco por tiu ĉi okupiĝado pri la primitivo, kio ja estas reakcio kontraŭ la civilizacio kaj la evoluo de la tekniko, kiu minacas fari nin mem maŝinoj, estas por la plej multaj homoj limigita al mallonga libertempo

aŭ ĉefe al 14-taga somerferio. Sed tiu estas nun ankaŭ multe eluzata por tiu celo. Homoj iras en la kamparon, kie ili en senpera kaj libera kunesto kun la naturo kaj la bestoj sentas sin pli liberaj kaj pli bonaj homoj, aŭ ili ĉirkaŭvojaĝas kun tendo kaj dormsako por vivi kiel eble plej primitive kaj serĉi solecon en la naturo.

Sed la nuntempa granda okupiĝo pri primitivo estas rimarkebla ankaŭ je multaj aliaj rilatoj. Samtempe kun la kreskanta fervoro por civilizaci la restantajn primitivajn popolojn, pilgrimas sciencistoj kaj aventuristoj al tiuj regionoj por esplori kaj trovi materialon por priskribi la paradiz-vivon de tiuj popoloj, antaŭ ol estas tro malfrue - situacio, kiu estas aktuala same multe en Grenlando kiel en Afriko kaj Ameriko. En sama maniero oni pli fervore ol iam esploras homan vivon de la pasinteco pere de arĥeologio kaj komparas kun nuntempa vivo ĉe primitivuloj.

Ankaŭ en arto primitivo estas objekto de intensa priokupiĝo. En la muzik-mondo oni ekkomprenis la valoron de malnova popolmuziko, kaj komponistoj kiel Bartók kaj Kodály en Hungario, la norvego Saeverud kaj la dano Vagn Holmboe ĉirkaŭvojaĝis kaj kolektis tiun popolmuzikan materialon, kiun ili poste prilaboris en siaj verkoj en same simpla kaj primitiva stilo. La amerika jazmuziko, kiu origine estas malnova popola dancmuziko, multe influas la artan muzikon de modernaj komponistoj. Tre admirindaj estas la eksperimentoj de amerika komponisto Gerschwin por altiĝi la jazon al arta standardo kiel en „Rhapsody in Blue“ aŭ en la opero „Porgy and Bess“.

Egale kun la pentro-arto, kies abstrakta esprimformo ĝuste devenas de simpla, natura ĝojo je la kunludo de koloroj kaj la vivo de formoj. Precipe ĉe la surealismo oni renkontas la menciitajn tendencojn al pliprofundigo en homaj sentoj, instinktoj kaj subkonscio, por kio oni uzas strangajn simbolojn, kiuj ofte havas rilaton al bestaj aŭ diaj signoj de antaŭaj primitivaj kulturoj.

Rilate al literaturo mi volas nur menciigi viron kiel Johs. V. Jensen, daŭrigo sur p. 66.

HILVERSUM, LA URBO DE NIA DEKA I.J.K.

La koro de la regiono „Het Gooi”, unu el la allogaj pejzaĝoj de Nederlando, estas la vilaĝurbo Hilversum. Vilaĝo ĝi estas laŭ modelo kaj konstruo, larĝa, kun multego da ĝardenegoj kaj parkoj; urbo laŭ ĝia vivo, kun la supermoderna radio-aparataro kaj gravaj industrioj. Preskaŭ centmil homoj loĝas en ĉi tiu admirinda loko, kiu antaŭ duona jarcento estis ankoraŭ nekonata kaj sensignifa.

En la historiaj kronikoj Hilversum estas nomata unuanfoje en 1305, tiam ĝi estis parto de la vilaĝo Laren. En 1424 Hilversum fariĝis memstara kun propra komunumestraro. „Karega perlo” ĝin nomis la vojaĝantoj kiuj venis al la brutfoiro aŭ vendis ĉi tie lanon al la teksejoj, kiuj dekomence floris en Hilversum. Sed ili ne vidis la akrajn kontrastojn en la vivnivele de la enloĝantaro; ili ne sciis, ke en la mezo de la deknaŭa jarcento infanoj, ne sepjaraj, laboris pli ol dek horojn potage en la teksejoj... Pri tiuj kontrastoj nun ankoraŭ atestas la imponaj vilaĝoj en la kvartalo Trompenberg kaj la kelkaj restintaj domaĉoj en malnovaj stratoj, kiuj aspektas ĉarme pitoreskaj, sed povos rakonti plorindajn historiojn.

La granda elkresko de Hilversum komenciĝis per la maŝinigo de la teksad-industrio kaj la evoluo de la radiotehniko. Restaĵojn de la malnova permana teksado vi retrovas nur en la muzeo, kiu situas en la iama urbdomo. Sed grandaj tapiŝofabrikejoj devenis de la malnova ĉefmetio de la hilversumanoj.

La radio eniris Hilversum per la starigo de fabrikejo por radioaparatoj. La firmao ne trovis aĉetantojn por siaj produktoj, ĉar ne estis disaŭdigita iu radio programo en Nederlan-

do. Tiam la entrepreno mem komencis prizorgi disaŭdigojn, kompreneble per tre modestaj rimedoj kaj simplaj programoj. Kiu nun legas aŭ aŭdas la rakontojn de la unuaj radiopioniroj, mire rigardas la modernajn kaj belegajn konstruaĵojn, en kiuj nun laboras la kvin radio unuigoj. En Nederlando ne, kiel en aliaj landoj, ŝtata entrepreno estras la radion; la registaro prizorgas nur la programojn, destinitajn por Ekster-Eŭropo. La disaŭdigoj de la stacio „Hilversum” estas en la manoj de kvin memstaraj unuigoj, kiuj laŭ membronombro povas disponi pri la elsendtempo. Sekve vi trovas en Hilversum kvin apartajn elsendejojn, kaj krome multaj aliaj konstruaĵoj estas okupitaj de administraciaj aŭ teknikaj radio-centroj.

Hilversum povas, de post unu jaro, ankaŭ fieri pri la posedo de la plej muzikala strato de la mondo. Favore al la radio-artistoj, kiuj loĝis dise en la lando, oni konstruis tute novan straton kun domoj, kiuj estas nun loĝataj ekskluzive de radio-artistoj. La straton, nomita Jacob van Campenlaan, oni ne povas trapasi sen aŭdi ekzercantajn muzikistojn. Eĉ formiĝis foje granda orkestro, en kiu ludis nur samstratuloj kaj ĝi estis nomita laŭ ĝia deveno „Jacob van Campenlaan” orkestro.

Hilversum rapide transformiĝis de malnova vilaĝo al moderna urbo. Pli kaj pli malaperas la malnovaj domaĉoj kaj mallarĝaj stratetoj, ilin anstataŭas modernaj laboristaj kvartaloj kaj larĝaj aleoj, borditaj de etaj kaj grandaj vilaoj. La rapide altiganta nombro da enloĝantoj necesigas kuran konstruadon de novaj loĝejoj, tamen nenie oni endanĝerigas la tipan trajton de Hilversum: spaco

kaj freŝa aero. La fakto, ke Hilversum havas multajn bonhavaĵojn kaj eĉ riĉajn urbanojn, resp. eguligas en ĝia aspekto: kelkaj kvartaloj similas grandajn ĝardenojn kun dise semitaj luksaj domoj kaj vilaĝoj, inter kiuj estas karaj perloj de la moderna arkitekturo. Prave Hilversum sin nomas „la ĝardeno de Amsterdam”.

Ĉi somere Hilversum fariĝas kosmopolita urbo, turistoj en- kaj ek-

sterlandaj svarmas tra la stratoj kaj okupas la hotelojn kaj pensionojn, ofte ĝis la lasta lito. Promenante tra la stratoj oni aŭdas ĉiujn dialektojn de la nederlanda lingvo kaj multajn fremdlandajn sonojn. Venantan someron, dum la kongressemajno de T.E.J.O., Esperanto aŭdiĝos en nia urbo. Zorgu, ke ĝi venos ankaŭ el via buŝo.

Roel Kraefft.

PROVIZORA KONGRES-PROGRAMO

Vendredon	23/7	vespere	} Alveno de la kongrespartoprenontoj.
Sabaton	24/7	matene	
		posttagmeze:	Solena inaŭguro de la kongreso. Akcepto de la urba estraro en la Civitana Salono de la hilversuma Urbdomo.
		vespere:	Interkona vespero en la kongresejo.
Dimanĉon	25/7	matene:	Protestanta kaj katolika diservoj en Esperanto.
		posttagmeze:	Publika propaganda kunveno sub aŭspicioj de N.E.J.O. aŭ C.K.E.J.N.
		vespere:	Grandstila nederlanda festvespero.
Lundon	26/7	dumtage:	Jarkunsido de T.E.J.O.
		vespere:	Internacia Kabaredo, prezentota de la kongrespartoprenontoj.
Mardon	27/7	dumtage:	Tuttaga ekskurso, i.a. al Madurodam, Hago, Scheveningen, Rotterdam k.t.p.
Merkredon	28/7	matene:	Ekskurso al Amsterdam.
		posttagmeze:	Vizito al la hilversuma foiro.
		vespere:	Kultura Vespero kun muziko, deklamoj kaj se eble filmo esperantlingva pri la akvokatastrofo en Nederlando.
Ĵaŭdon	29/7	vespere:	Internacia Balo.

Krome: Paroladkonkursoj, sporto. Ĉiutage aperos la parolata gazeto, kun novaĵoj kaj ridindaĵoj el la tuta mondo. Krome ni verŝajne eldonos kongresbultenon.

Ĉi tiu programo estas nur provizora, do ni rezervas al ni la rajton fari en ĝi ŝanĝojn. Ŝanĝiĝoj tamen okazos nur por plibonigi la tuton. Pluaj informoj haveblaj ĉe:

LOKA ORGANIZA KOMITATO de la 10a I.J.K. de T.E.J.O., Lobeliastraat 4, Hilversum, Nederlando.

LA NOVA NEDERLANDA URBETO MADURODAM.

Komercaj kaj privataj domoj, kasteloj kaj muelejoj, kanaloj, flughaveno kaj stacidomo situas en la teritorio de Madurodam (Nederlando).

Senhalte, funkciantaj aŭtomobiloj sur larĝaj aŭtostratoj, 8 specialaj vagonaroj, mar- kaj river-ŝipoj pravas la vivon de la urbeto. Vespere, kiam vi promenas tra la stratoj lumigitaj de 16.000 lampetoj, stranga estas la impresoj, kiun vi havas pri la lum-urbo.

Tamen, kompetentaj kartografistoj forgesis menciigi Madurodam sur la landkartoj.....

Kial do? ... pro simpla detalo pri mezuro! Efektive Madurodam estas kvazaŭ song-urbeto. Kvankam ĝia surfaco estas ne pli granda ol 15000 kvadratmetroj, oni vidas la bildon

de originala nederlanda urbo kun ĝia ĉirkaŭaĵo en DUDEKKVINONO de la vera grandeco.

Multaj junuloj kaj plenaĝuloj vizitas ĉiujare Madurodam kaj tion ni baldaŭ faru.

La miniatura urbo MADURODAM-en Hago estas preta akcepti vin kaj, post la vizito, vi eble ankaŭ havos la okazon gustumi indoneziajn mangajojn en la Madurodam - a normale granda restoracio - kaj renkonti konatajn najbarojn kiel Andreo CSEH, sekretario de la Universala Ligo, kies oficejo estas tute proksima, en la koro de Hago, -.

Ĉu ne estas vera vojaĝo al LILIPUTLANDO?

L. G.

Anoncu vin kiel eble plej baldaŭ por la kongreso.

daŭrigo de paĝo 63.

kiu en sia granda verko „La longa vojaĝo” sub influo de darvinismo serĉas reen al pratempo kaj provas klarigi la historion de la homa evoluo.

La okupiĝo pri primitivo estas en proksima kontakto kun la nuntempa gloro de la infano, kies primitiva, kvankam neniel simpla anima vivo tiom okupas la modernan psikologion, kio ankaŭ respiguliĝas en moderna literaturo. La infano ja fariĝis preskaŭ la dio de nia tempo, kaj en multaj rilatoj ĝi faras sian influon, pere aŭ senpere. Sed ĉu estas ne ĝuste la infana koncepto kaj sinteno al la aferoj, kiujn oni en arto provas konservi kiel la plej nefalsigitajn kaj

indajn? La infano vidas per freŝaj okuloj la mondon de la aferoj. Ĉe ĝi la plej ordinaraj kaj etaj objektoj kiel pajlo aŭ akvoguto povas kaŭzi enhavriĉan travivaĵon. Plenkreskuloj, por kiuj la infaneco fariĝis perdita lando, ekkomprenis, ke oni povas multe lerni de la infano.

Oni ne povas trotaksi la gravecon de la moderna infanpsikologia esploro, kvankam ĝiaj rezultoj kelkfoje povas ŝajni iom troigitaj. Tempo montros, ĉu ĝi havis eblecon formi homojn, kiuj pli bone ol nia generacio kapablas unuigi la nature homan kun la tempa evoluo.

Ethel Hansen.
jan. 1954.

Kritiki estas facile, fari malfacile.

Ni bezonas vian helpon

por la granda varbfesto (Esperantobalo!) por la Berlina junularo, kiu okazos paskon en Berlino.

Tiu aranĝo estas tre grava por nia estonta laboro! Estas necese, ke ni povu voĉlegi multajn salutojn el aliaj landoj. Do, helpu al ni kaj sendu saluton aŭ instigu viajn gekorespondantojn ĉi-rilate.

Detaloj pri la paska renkontiĝo:

Tempo: 16.4.54-19.4.54; **renkonteĝo:** „Schwimmende Jugendherberge Heinrich Zille“, Saatwinkel, Schwarzer Weg; **Kotizo:** (inkl. tranokt-kaj nutradkostoj, enirbileto por la „Balo de la Esperanto-junularo“, vizito de teatro kaj „Zoologia ĝardeno“) 6.— gm. okcidentvalore.

Berlinaj partoprenontoj ekde tuj

Karaj geamikoj,

La estraro de Germana Esperanto-Junularo invitas vin ĉiujn al

Interzona Junular-Renkontiĝo Esperantista

okazonta de la 16-a ĝis la 19-a de aprilo 1954 en Berlino!

Por la unua fojo post la milito ĝi estos granda Esperantista aranĝo, kiun partoprenos ne nur la junularo el la okcidento, sed kiun ĉeestos multnombre ankaŭ gejunuloj el la orienta zono de nia patrujo, kie nia lingvo nuntempe estas subpremata — sed neniam mortonta!

Berlin, la plej interesa urbo de nia kontinento, estas la plej inda loko

Respondo al ĉiuj garantiita!

Adreso:

GEJ (Loka Komitato)
Helmut Lehmann
Berlin - Neukölln
Bornsdorfer Str. 27.

anoncu sin ĉe la estro de EJB, kiu samtempe akceptas la kotizon. La kotizo de ne-Berlinoj estu pagota al: Esperanto-Liga Berlin, Berlin-Wilmersdorf, Konto-Nr. 705.50, Berlin West. Moto: DEJ-paska renkontiĝo.

Do, amiko, partoprenu la GEJ-Kunvenon!

por tiu ĉi unika renkontiĝo, kies programon preparis GEJ en kunlaboro kun la Esperanto-Junularo de Berlino.

Berlin, la historia germana ĉefurbo estu la celo de via paska vojaĝo! Sendube neniam vi forgesos la vidindaĵojn, kiujn ofertas al vi la granda metropolo kaj insulo de la libereco.

Germana Esperanto-Junularo atendas vin kaj promesas al vi krom interesan programon agrablan kaj harmonian restadon en samideana rondo. Ĉie nun ekzistas bonaj vojaĝeblecoj al Berlino (vidu ĉikoncernajn informojn). Do, aliĝu tuj kaj

estu bonvenaj en libera Berlino!

GERMANA ESPERANTO-JUNULARO
federacia estraro
Herford / Westf., Sandbrede 37.

Seminario por Cseh-metodaj ĝeinstruistoj gvidanto: **Andreo Cseh**, organizata en Haarlem dum 3 tagoj antaŭ la kongreso (29-31 de julio), kondiĉe, ke sufiĉe multaj esperantistoj aliĝos

ANTAŬ la 1-a de MAJO.

En la seminario s-ro Cseh klarigos la metodon kaj la manieron prezenti la lecionojn. La kurso estas destinita nur por personoj, kiuj jam scias Esperanton.

KOTIZO: 24 steloj; por 2 personoj el la sama familio 40 steloj kune. (unu stelo = 6 br. pencoj aŭ 25 ned. cendoj).

ALIGO: Partoprenontoj bonvolu anonci sin kiel eble plej baldaŭ, nepre antaŭ la 1-a de majo kaj samtempe pagi la kotizon al nia Instituto aŭ al la landaj reprezentantoj de Universala Ligo.

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO
Riouwstraat 172, DEN HAAG, NEDERLANDO.

Mihael kaj la Akvo-Elfino

de Pastro W. J. Downes.

En la Schwarzwald (Nigra Arbarego) kelke da mejloj for de la Lago Mummel troviĝis vilaĝo. Ĉiujare je la unuaj tagoj de Majo la enloĝantoj de tiu vilaĝo amuzis sin per dancado, ludado, kaj festado. Tio ja estis gaja tempo por ĉiuj, precipe por la gejunuloj.

En la tempo de mia rakonto venadis al tiuj festoj stranga junulino, kiu mistere aperis kaj partoprenis en la gaja dancado. Laĉo da perloj kunligis ŝiajn harojn, kaj alia laĉo pendis ĉirkaŭ ŝia kolo. Ŝi estis vestita per verda silka robo, kiu belege alsidis al ŝia gracia figuro. Ŝiaj trajtoj estis tiel rave belaj, ke la pulsbatoj de la koroj de la junuloj plirapidigis, kiam ili parolis kun ŝi aŭ dancis kun ŝi.

Ŝajnis, ke ŝi favoris unu junulon, Mihael Stauf, pli ol ĉiujn aliajn. Ĉe luktado kaj boksado li estis la plej forta el ĉiuj, kaj li estis la plej sperta dancanto. Kiam ŝi kaj li dancis kune, la maljunuloj diris, ke ili neniam vidis pli belan paron.

Tamen, ĉiam, kiam la horloĝo batis la dekunuan horon, la junulino disigis sin for de la dancantoj kaj rapidis en la arbaregon. Ofte iu junulo sopire sekvis ŝin, sed ĉiufoje ŝi malaperis antaŭ ol li povis atingi ŝin. Sed en unu okazo, Mihael sekvis ŝin, kaj kvankam li ne povis vidi ŝin, li vidis signojn, kiuj markis la vojeton, kiun ŝi laŭiris. Li plirapidigis siajn paŝojn kaj fine atingis ŝin. Ili antaŭen marŝis flanko ĉe flanko, kaj ŝi kondukis lin laŭlonge de vojeto, kiun li neniam antaŭe konis. Tio surprizis lin, ĉar lia hejmo troviĝis en tiu arbarego, kaj li opiniis, ke li konis ĉiun vojeton en ĝi.

Post iom da tempo ili atingis laĝon. Li demandis ŝin, ĉu ŝi konsentus iri returne kun li al lia bieno, kaj esti lia edzino. Ŝi respondis, ke ŝi demandos sian patron pri la afero, sed ŝi avertis la junulon, ke ŝia patro estas severa kaj obeenda viro, kaj ke ŝi havas dubon, ĉu li permesus tian geedziĝon.

Dirinte tion, ŝi saltis en la akvon kaj malaperis el lia vido.

Mihael do tiam komprenis, ke ŝi estas akvo-elfino. Tamen, lia amo al

ŝi tute ne malgrandiĝis; kontraŭe li konstante pensadis pri tio, kiel li povos gajni ŝin.

Dum la somero post tiu Maj-festo Mihael devis laboregi sur sia bieno, kaj li ne havis multe da tempo por longa meditado pri edziĝo. Sed kiam venis la vintro, li havis multajn liberajn horojn, kaj li okupis ilin, bildigante al si, kia feliĉego venus al li, se li nur povus fari tiun belan junulinon en la verda robo la estrino de lia bieno. Tage kaj nokte li sonĝis pri ŝi, kaj ne plu li deziris la plezurojn, kiujn li antaŭe trovis kun siaj kamaradoj en la vilaĝo. Ofte la junulinoj demandis sin, kiel la riĉa Mihael jam ne vizitas ilin en ilia socia rondo.

Plena de sopiro Mihael atendis ĝis la sekvanta Majfesto. Kiam fine arvenis la unua tago de Majo, li estis la unua sur la vilaĝa herbejoplaco. Liaj esperoj ne trompis lin, ĉar kiel antaŭe la bela junulino subite aperis kaj aliĝis al la gaja homamaso. Ŝi dancis kaj babilis kun Mihael, kaj kiam la dekunua horo sonis de la turo de la vilaĝa preĝejo, ŝi permesis, ke li akompanu ŝin ĝis la lago. Kiam li parolis al ŝi pri siaj pensoj pri ilia geedziĝo, ŝi fariĝis tre malĝoja.

„Mia patro,” ŝi diris, „ne permesas, ke mi edziniĝu kun mortema viro, kaj li estas tre severa, li ne toleras malobeon.”

„Virino lasos patron kaj patrinon, kaj aliĝos al sia edzo,” li ekkriis; „se vi konsentos, ni iros tuj returne al mia hejmo, ni tuj geedziĝos; kaj kiam vi estos mia edzino, ni defios iun, kiu provos forpreni vin kontraŭ la volo de ni ambaŭ!”

„Silentu!” ŝi diris, timigite, „ke mia patro ne aŭdu viajn vortojn. Ĉu vi vidas la riveretojn kaj laĝetojn ĉirkaŭ ni? Ili ĉiuj estas je lia dispono; se li ordonos, ili ĉiuj pli kaj pli grandiĝos, kaj fariĝos furiozantaj torrentoj por dronigi nin. Ne instigu lian koleron. Li rifuzas rilati kun mortemaj homoj, ĉar ili moknomis lin „Anas-beko,” ĉar li havas nazon similan al la beko de anaso, kiel ja havas ĉiuj viroj ĉe ni. Tamen, al vi li estas amikema, kaj li sendis al vi ĉi tiun ringon. Jen, fiksita en ĝi estas gran-

da juvelo. Tio montros al vi, kie ĉiuj trezoroj de la tero estas kaŝitaj."

Dirinte tion, ŝi metis la ringon sur lian fingron. La juvelo ekbrilegis kiel la radioj de la suno, kaj kiam li turnis ĝin en direkto al la tero, li vidis en la profundaĵoj sub siaj piedoj vejnojn da oro kaj da arĝento, kiuj etendis sin tra la tero simile al glaciigitaj riveroj.

„Mirinda vidaĵo!" li diris, „sed mi deziras nenian alian trezoron, ol vin. Mi jam estas sufiĉe riĉa, por ebligi, ke vi kaj mi povus vivi kune senmanke."

En tiu momento ili atingis la bordon de la lago, kaj post rapida adiaŭo ŝi malaperis sub la akvo.

Mihael estis kuraĝa kaj sentima junulo. Se li jam permesis ideon ekloĝi en lia kapo, nenio povis elĵeti ĝin. Plaĉus al li havi antaŭ si la Akvoreĝon, por ke li batu lin ĝis la tero. Sed tio ne estis ebla; li do devis kontentigi sin, farante planon, laŭ kiu li eble povus gajni al si la belan junulinon.

La postan tagon ŝi denove venis al la danco, kaj ŝi estis pli bela, kaj pli amikina al li, ol iam antaŭe. Kiam krepuskiĝis, li ŝtele foriris kaj grimpis la turon de la preĝejo kaj movis la montrilojn de la horloĝo ĝis ili montris unu horon malfrue. Kiam li revenis, li disige forĵetis junulon, kiu estis dancanta kun lia amatino, kaj tute dum la resto de la vespero li dancis kun ŝi, kaj li dancis kvazaŭ por sia vivo. Nek li nek ŝi fariĝis laca. La flaŭtistoj fariĝis bluvizaĝaj; la brakoj de la violonistoj laciĝis, sed ili ne kuraĝis ĉesi ludi, ĉar ĉiufoje kiam li dance preterpasis ilin, li tre severe minacis ilin, kaj promesis grandan rekompencan.

Fine la turhorloĝo batis dek unu batojn. La junulino tuj liberigis sin el liaj brakoj kaj ekiris al la arbaro. Li sekvis ŝin, kaj apenaŭ ili faris kelke da paŝoj, ili aŭdis la turhorloĝon en apuda vilaĝo bati dek du batojn.

La junulino estis terurita kaj ŝi tremis per la tuta korpo. Li konfesis al ŝi, kion li faris, kaj ĵuris, ke ŝi estu lia edzino en tiu sama nokto. Tamen, lia urĝado, lia argumentado, estis tute vanaj; ŝi plirapidigis siajn paŝojn kaj senĉese ploris kaj lamentis.

Fine ili staris sur la bordo de la lago, kiu spegulis la brilantan diskon de la plena luno. Vane li provis reteni ŝin. Ŝi flustris tre mallaŭte: „Atentu pri tio, kio okazos. Se en la lago aperos lakteca koloro, tiam mi estos sekura kaj nepunita — kaj tiuokaze mi fariĝos via edzino; sed se en la lago aperos sangeca koloro, tiuokaze mi estos punita kaj perdita."

Apenaŭ ŝi diris tion, ŝi saltis en la lagon kaj dronis sub la akvon. Ĉe la loko, kie ŝi ensaltis, restis funelforma kavo, kaj de ĝiaj randoj ondetingoj etendis sin sur la tuta supraĵo de la lago.

Mihael kun fiksita atento rigardis la akvon ĉirkaŭ la funelforma kavo, kaj jen de el la fundo de la kavo supreniris ne lakteca, sed sangeca koloro, kaj li aŭdis teruran krion, kiu ŝiris lian koron kiel la enpuŝo de ponardo.

„Iio, vi diablaĉo!", li ekkriis, „Vi murdinto de via propra infano! Reprenu vian magian ringon, vi malbenita anasbeko!" Kaj li ĵetis la ringon kontraŭ rokon en la lago, tiel ke ĝi frakasiĝis en mil pecojn. Tuj kiam la pecetoj tuŝis la akvon ĝi komencis ŝaŭmi kaj bobeli, kvazaŭ subtera fajro igas ĝin bolegi. La akvo kreskis kaj kreskis, pli kaj pli alten, kaj en ĝia mezo aperis giganta ondego krescita de ŝaŭmo. La lago spasmis kaj ĝiaj profundaĵoj sovaĝe furiozis. Ĝi superfluis sian bordon, kaj la giganta ondego kunportis kun si la batalantan junulon spite de ĉiuj liaj malesperaj klopodoj.

Malproksimen en ĉiuj direktoj la inundego kaŭzis teruran detruon, kaj neniam plu oni aŭdis ion pri Mihael aŭ pri la Virgulino de la Lago.



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Anglujo: Derek Ulrich, 127 Wood Lane, Dagenham Essex, dez. kor. k.ĉ.l. Resp. garantiata.

Bulgarujo: Venelin Ĥitilov, Rusalka 28, SOFIA-5. (19 j. studento) dez. kor. pri ĉiuj temoj kun la tuta mondo.

Francujo: Anoj de la „Groupe Esperantiste du Lycée Turgot” 69 rue de Turbigo, Paris 3e, gvidanto Sro Rob. GERARD, dez. kor. kun junaj gekomercistoj, aŭ komercstudentoj.

FACILAJ LEGAĴOJ.

Kiel konstruas la eskimoj siajn domojn?

La eskimoj loĝas en Grenlando. Grenlando kuŝas sur la norda poluso. Tie estas ĉiam malvarme. Vi scias, ke en malvarmo nenio povas kreski. Do ankaŭ arboj ne kreskas por konstrui domojn. Grenlando estas kovrata per neĝo. La eskimoj estas saĝaj homoj. Ili uzas la neĝon por konstrui domojn. Vi certe demandas kiel?

Mi tion rakontos al vi.

La eskimo-domkonstruisto segas grandajn kvarangulajn blokojn el neĝo. Li metas la blokojn sur la teron unu apud la alian kaj formas tiel cirklon. Sur la unuan vicon li metas duan, trian, kvaran, li laboras diligente, ĝis la domo estas preta. La neĝblokojn li faras sube malrektaj. Tiel li povas formi belan kupolon. Ankaŭ la flankoj de la neĝblokoj estas iom malrektaj. Tiam ili ne tiel facile glitas.

Kiam la konstruado estas preskaŭ preta, ke supre estas nur malgranda truo, tiam li fermas tion per peco da glacio.

La konstruisto estas ankoraŭ ĉiam en la domo; li konstruas la domon de interne. La helpantoj staras ekstere kaj donas al li la neĝblokojn. Ne tiel, kiel oni konstruas la ŝtonajn domojn.

Li bele egaligas la murojn sur la interna flanko per sia tranĉilo laŭ bezono. Kiam la domo estas tute preta, li faras malgrandan aperturon por la enirejo. La aperturo estas tiom malgranda, ke oni povas nur rampe el- aŭ eniri. Antaŭ la enirejon li konstruas longan tunelon (ankaŭ per neĝoblokoj). Tiam la malvarmaj ventoj ne povas enblovi en la domon.

La eskimoj ne havas kamentubojn. Ili ne bezonas tion. Ili ja havas nek lignon nek karbojn por hejti.

Super la enirejo ili faras aperturon por la fenestro. Sed ili ne havas vitron. Ĉu vi scias, per kio ili fermas la truon? Per tre maldika, tute travidebla glacipeco.

Ĉu vi ŝatus loĝi en Grenlando?

la burgono



MONATA ORGANO
POR LA ASPIRANTAJ ANOJ



La bubalo de Saïdjah.

(Laŭ Multatuli).

„Rapide, rapide!” vokis Saïdjah al sia bubalo. Vane. La besto ne volis sin movi.

„Rapide!” vokis Saïdjah.

Sed la bubalo staris senmova.

Saïdjah koleris. Li diris tre malbelajn vortojn. Ho, li pensis nenion malbonan. Li diris nur vortojn, kiujn li ofte aŭdis de grandaj homoj. Kiam tiuj estis koleraj.

Sed liaj malbelaj vortoj tute ne helpis.

La bubalo staris senmova.

Ĝi skuis sian kapon. Ĉu ĝi volis forjeti la jugon? El ĝia nazo venis vaporo ĝi tremis ĝi laŭte spiris. En ĝiaj bluaj okuloj estis timo. Ĝi tiris sian lipon supren. Ĝiaj dentoj estis videblaj.

La fratetoj de Adinda vokis:

„Savu vin, Saïdjah! Savu vin! Jen venas tigro!”

Kaj ili forjetis la jugojn de siaj bubaloj. Ili saltis sur la larĝajn dorsojn de la bestoj kaj forgalopis.

Sed Saïdjah ne iris kun ili. Ankaŭ li forjetis la jugon de sia bubalo. Ankaŭ li saltis sur la dorson de la besto. La bubalo ekkuris kaj Saïdjah falis sur la teron.

La bubalo timis. La tigro estis tre proksime.

La besto rimarkis, ke Saïdjah falis. Ĝi sciis, ke la morto atendas je sia malgranda amiko. La tigro ja murdos Saïdjah-on. La bubalo haltis. Ĝi returnis kaj ekstaris super la korpo de malgranda Saïdjah. Sian kapon li turnis en la direkton de la tigro.

La tigro estis jam tre proksime. Ĝi saltis. Sed ĝi saltis la lastan fojon. La kornoj de la bubalo atendis ĝin. La tigro saltis sur la kornojn. la kornoj distrancis la ventron de la tigro.

Tiel savis la bubalo de Saïdjah la vivon de sia amiketo.

La granda hundo kaj la malgranda kato.

Maria havas du bestetojn. Unu hundon kaj unu katon. La hundo estas granda. La kato estas malgranda.

La hundo kaj la kato estas iam bonaj, iam malbonaj amikoj. Kiam Maria estas hejme, ili ĉiam estas bonaj amikoj.

Nun estas Maria en la lernejo. La granda hundo kaj la malgranda kato kuŝas sur la tapiŝo antaŭ la forno. Ili dormas. La hundo sonĝas: ĝi manĝas bongustan oston. Ĝi vekiĝas. La oston ĝi ne vidas.

„Vaŭ, vaŭ, kie estas mia osto?” ĝi bojas.

La kato ne aŭdas tion, ĝi dormas.

„Vaŭ, vaŭ, vuf, vi manĝis mian oston” ĝi diras al la kato. Ĝi frapas la kapon de la kato.

La kato malfermas la okulojn. Ĝi estas kolera. Kial la malbela nigra hundo frapas ĝin? Ĝi nenion faris.

„Miaŭ, vi estas malbela besto”, ĝi krias kaj gratas la hundon.

La hundo estas pli granda. Ĝi estas pli forta. Ĝi frapas la katon.

La kato mordas en la piedon de la hundo.

La hundo estas pli kolera.

Ĝi volas mordi la katon.

„Vi estas malbela, malbela besto”, miaŭas la kato.

„Vuf, vuf, vi estas malbela. Mi estas la plej bela hundo en la tuta urbo.” Kaj ĝi ankoraŭfoje frapas la katon.

La kato volas grati la vizaĝon de la hundo. La hundo frapas denove la katon.

Maria venas el la lernejo. Ŝi aŭdas la spektaklon. Ŝi iras en la ĉambron.

„Fi, hontu ambaŭ”, ŝi diras.

Ŝi iras al la kuirejo, alportas teleron da lakto.

La hundo kaj la kato ne plu batalas, ili rigardas al la telero da lakto.

Maria metas la lakton apud la tapiŝon.

La hundo kaj la kato forgesas, ke ili batalis. La hundo forgesas pri la osto.

Ili staras unu apud la alia kaj trinkas la lakton.

Ili estas denove amikoj.

Maria estas kontenta. La granda hundo estas kontenta kaj la malgranda kato estas kontenta. Ili ĉiuj tri estas kontentaj.